Jarkolekto 17 Kvarmonata N-ro 1, 1987

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Bociort, I. (R)
Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Kiselman, K. (S)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK H-1364 Budapest, Pf. 107

Presado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antwerpen

Enhavo

HELMUT SONNABEND (1924-1986)
Niaj du tezoj pri la Jubilea Jaro 1

KONFERENCA PRELEGO
Van Damme, E. – *Enkodigo en Esperanton* 3

LINGVISTIKO
Kiselman, Ch.O. – *La problemo de duarangaj derivaĵoj* 11

METODIKO
Hoekstra, O. – *La esplor-kreiva vojo* 20

RETROSPEGULO 22

PERFEKTIGO DE PEDAGOGOJ
Zlatnar, P. – *La unua generacio de 'oficialaj' Esperanto-instruistoj en Jugoslavio* 24

RAPORTO
La kvara internacia metodika seminario 29

AKTUALAĴOJ
okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj 34

LIBROBRETO 36

Jarkolekto 17 **februaro 1987** **N-ro 1, 1987**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj eĉ rekomendataj kune kun fontindiko.

HELMUT SONNABEND
(1924-1986)

Ĝis sia lasta spiro li laboris por ILEI. En novembro 1986 li lanĉis cirkuleron al la Estraro de la Ligo, al la Sekcioj kaj interesitoj: "Konsideroj, sugestoj...", kvazaŭ lia testamento. En tiu dokumento li lastfoje esprimas siajn zorgojn, donas konsilojn al tiuj, kiuj transprenis de li la torĉon. Al tiu cirkulero li alkroĉis slipeton manskribitan: "Detala letero sekvos". Tiun leteron ni jam neniam ricevos. Post kelkaj semajnoj, la 9an de decembro, li definitive forlasis nin.

Estos la tasko de historiisto pritaksi la signifon de *Helmut Sonnabend* en la historio de la esperantista pedagoga movado. La impresoj estas tro freŝaj, tro profundaj por paroli nun pri li 'proze'. La sentoj tro fortaj por trovi konvenajn vortojn, la vundoj tro sangaj por historiumadi, analizadi, la sciigo tro neatendita, tro ŝoka por apreci kaj pritaksi liajn meritojn. Al tio ni revenos poste. Sed jam nun kaj ĉi tie kun absoluta objektiveco ni deklaru: forpasis eble la plej elstara persono de la historio de ILEI, kolego, talenta kaj fervora gvidanto kiu dediĉis la lastajn jardekojn de sia vivo al ILEI por savi ĝin, neniam ŝparante tempon, forton, energion, monon. Sed tiun superhoman laboron lia koro ne povis elporti. Perfida malsano atakis lin ĝuste tiam, kiam la fruktoj de lia aktiveco komencis maturiĝi. La tuta anaro de ILEI dum

jaroj admiris lian superhoman batalon kun la kruela morbo. Fine li devis cedi.

La modernan periodon de la historio de ILEI markas lia nomo kaj la nomo de lia intima kunlaboranto kaj amiko *Mario Dazzini,* forpasinta antaŭ li. Ĝuste tial iliaj nomoj kune vivos ĝis tiam, ĝis kiam ekzistos esperantistaj pedagogoj, funkcios ilia Ligo kaj aperados la revuo, revivigita ĝuste de li.

Kara amiko! En la vivo vi neniam ripozis. Nun ripozu trankvile. Ni neniam forgesos vin, ni gardos vian memoron kaj ni klopodos daŭrigi vian laboron.

István Szerdahelyi

NIAJ DU TEZOJ PRI LA JUBILEA JARO

A) 1987 estos festa jaro
B) 1987 estos labora jaro

Se vi pli konsentas kun (A), vi pravas, ĉar ni festos — laborante.
Se vi pli konsentas kun (B), vi pravas, ĉar ni laboros — festante.

Serioze, ĉi-jare labori estos pli grave, ol festi, ĉar ni festos por ni mem, sed labori ni devos precipe por la ne-esperantista mondo. Tiu mondo direktos al ni pli grandan atenton ol iam ajn: ni devas kapti tiun okazon, ni devos **nin montri**, por ke la mondo vidu nin — per bonaj okuloj.

Estu 1987 la jaro, kiu garantios la saman bonvolan atenton por 1988, 1989... kaj por 2087!

Feliĉan kaj sukcesplenan novan jaron deziras al ĉiuj siaj legantoj

I.P.R.

Konferenca Prelego

ENKODIGO DE ESPERANTO*

Emile VAN DAMME

Kodo

Se oni konsideras lingvon kiel konvencian kodon uzatan por la komunikado, oni povas paroli pri "kodigo, enkodigo, dekodigo kaj elkodigo" de komunikaĵo.

"Kodigo" estas la transformo de iu aro da signoj en kodon.

"Enkodigo" estas la transformo de iu mesaĝo (komunikaĵo) en signoĉenon kongruan kun iu kodo.

"Dekodigo" estas la ekkono de la semantika enhavo de iu enkodita signo-ĉeno, do plej ofte ĝia transformo en lingvon konatan de la interesito.

"Elkodigo" estas dusenca kaj evitenda vorto. Ĝi povas signifi (a) pro analogio kun vortoj kiel *eliri, elpeli,* ke oni eligas ion el iu kodo, ekz. iun simbolon aŭ signon; (b) pro analogio kun vortoj kiel *eluzi, eltrinki,* ke oni ĝisfine kodigas iun aron da signoj.

Kadre de la ĉi-tie pritraktota temo, la "enkodigo" estas la traduko en Esperanton de iu mesaĝo, ĉu ĝi estas jam esprimita en iu lingvo aŭ ĉu ĝi nur estas konceptita en la cerbo sed ankoraŭ ne esprimita.

Ĉar nur Esperanto estas el certa vidpunkto tute specifa kodo, ege malsimila al aliaj lingvaj kodoj, ni povas atendi ke la problemo de enkodigo en Esperanton ankaŭ estos ege malsimila al tiu de la enkodigo en aliajn lingvojn. Inter aliaj, la rilato inter la kompetenteco de la uzanto kaj lia performanco povas esti tute alia en Esperanto ol en aliaj lingvoj, precipe dum la fazo de la eklernado de la lingvo.

---

* La prelego okazis dum la 20-a Konferenco de ILEI en Louvain-la-Neuve, la 17-an de julio 1986.

Kompetenteco kaj Performanco

Pro tio, ke ies kapablo sin lingve esprimi dependas i.a. de du faktoroj — lia kompetenteco kaj lia performanco en tiu lingvo (kodo) — ni rememorigu rapide kiuj estas tiuj faktoroj kaj kia povas esti la rilato inter ili.

Jam DE SAUSSURE faris la faman distingon inter *langue* kaj *parole,* en kiu *langue* estas la lingva sistemo kiel sumo de la baz-elementoj de iu lingvo kaj de ilia kombinadreguloj, dum *parole* estas la lingva uzado kiel ĝi konstatiĝas en la praktiko.


CHOMSKY relanĉis la problemon en 1965 en sia *Aspects of the theory of syntax,* konsiderante pli precize la lingvan aktivecon sur individua nivelo. Dĕ li devenas la alia, egale fama distingo inter *competence* kaj *performance,* germane *Kompetenz* kaj *Performanz* — esperantlingve "kompetenteco" kaj "performanco". Sub kompetenteco, li komprenas la konon, kiun iu lingvo-uzanto posedas de sia lingvo; sub performanco la efektivan uzadon de tiu kono far la uzanto.

Tiaj distingoj povas utili por karakterizi variajn procezojn aŭ stadiojn de ies lingva kono. Precipe la rilato inter ili montriĝas utila parametro tiucele, kiel ni provos montri ĉi-poste.

La kompetenteco de individuo en iu lingvo preskaŭ ĉiam superas lian performancon. Efektive, ĉiu lingvo-uzanto konas, aŭ pli bone, rekonas lingvajn erojn kiujn li mem ne uzas aŭ eĉ ne kapablas uzi. Tiaj eroj povas ekzemple deveni el aliaj geografiaj lingvo-areoj. Anglo rekonas usonajn vortojn kiujn li mem neniam uzas. Aliaj neuzataj vortoj aŭ strukturoj devenas el alia historia fazo de la lingvo (arkaismoj) aŭ el certaj lingvaj niveloj, ekz. "odontalgio" vidalvide de "dentodoloro". En ĉiuj tiaj kazoj, la kompetenteco superas la performancon de la lingvo-uzanto. Bone konata estas la kazo de ne-klerulo kiu rekonas ĉ. 10 000 vortojn de sia gepatra lingvo sed uzas nur ĉ. 2 000 (pasiva kono kaj aktiva uzado).

Diagrame tia situacio estas jena:

Diagrame tia situacio estas jena:




Interparenteze estu dirite, ke ni povus imagi personon kiu ekzemple en fremda lingvo multe komunikas, sed en tute neortodoksa lingvo. En jena mesaĝo: "Mi fari labor por familjo de mi", la komunikado bone funkcias; ĝi superas la kompetentecon, sed la lingva performanco estas aĉa. Ni do devas distingi inter la **komunika performanco** kaj la **lingva performanco**. Krome, ankaŭ gestoj aŭ mimiko povas kontribui al la komunika performanco sen plibonigi la kompetentecon aŭ la lingvan performancon.

La rilato inter kompetenteco kaj performanco

En la kampo de lingvo-lernado, la rilato kompetenteco/performanco povas riveli specifajn trajtojn de la lernata lingvo. Lernantoj de la angla, ekzemple, kutime progresas relative facile dum komenca fazo de la akiro, verŝajne ĉar kelkaj simplaj fraztipoj konstruiĝas en tiu lingvo sen implici tro de gramatikaj mekanismoj. La malfacilaĵoj tamen multobliĝas ĉe pli detala pristudo.

Diagrame:
Lernado de la angla:
kompetenteco kaj performanco
kreskas rapide ĉekomence:



Male, ĉe la akiro de la germana lingvo, oni bezonas relative pli da kompetenteco ĉe la komenco; kompetenteco kaj performanco do kreskas malrapide. Sed poste la akiritaj mekanismoj ebligas pli grandan lingvan produktadon.

Diagrame:



Lernado de la germana:

Notindas, ke la gepatra lingvo de la lernanto povas akceli aŭ bremsi la akiron de fremda lingvo. Oni povus paroli tiurilate pri **negativa** aŭ **pozitiva substrata kompetenteco**.


Kompetenteco kaj Performanco en Esperanto

La akiron de kompetenteco akcelas la foresto el la lingvo de malregulaĵoj kaj esceptoj. Pro tio, oni komprenos ke tiu akiro en Esperanto estas pli facila ol en aliaj lingvoj. Krome, danke al la kombineblo de Esperantaj lingveroj, la kono de kelkaj el ili ofte ebligas grandan lingvan produktadon. Ekzemple, la kono de la eroj el la ĉi-suba tabelo (kompetenteco) ebligas la produktadon de pli ol 400 vortoj (performanco).

----	LONG	----	-o
mal-	LARĜ	-et-	-a
pli-	ALT	-eg-	-e
	BEL	-ec-	-i
	RAPID	-ul-	
	JUN	-ig-	
	BON		
	RIĈ		
	FORT		
	KURAĜ		
	DIK		


Kiel oni vidas, en Esperanto, la produktado de vortoj, do la performanco en la leksikona kampo, povas altgrade superi la kompetentecon pri vorteroj.

Ĉe lerta Esperanto-lernanto, la rilato kompetenteco/performanco povus aspekti jene:



Ne necesas diri, ke tia situacio estas unika kaj ke ĝi eblas nur ĉar en Esperanto la kombinado de vorteroj funkcias tute regule kaj sen iu ajn escepto.

Se nun en la lasta diagramo ni reduktas la kompetentecon ĝis preskaŭ nulo, ni tamen povas ankoraŭ esperi iom da performanco; certe pli ol en la kazo de etnaj lingvoj. Ni akiras jenan, sufiĉe mirigan diagramon, en kiu la altiĝo de la performanco, eĉ ĉe konstanta kompetenteco, rezultas el la supozebla plilertiĝo de la lernanto en la kombinado de baz-elementoj.



Ĉu performanco ĉe kvazaŭ nula kompetenteco?

La supra diagramo sugestas la ideon ke, helpe de taŭgaj iloj, oni kapablus atingi ian gradon da performanco eĉ ĉe kvazaŭ nula kompetenteco! La iloj estus ekzemple bona vortaro kaj sinoptika tabelo pri la gramatiko.

La defio estas do jena: Ĉu helpe de la necesaj iloj, ne-esperantisto kapablus produkti seneraran Esperantan mesaĝon? Ĉu oni kapablus skribi leteron, traduki aŭ verki tekston en Esperanto **sen scipovi la lingvon**?

Memkompreneble, la substrata kompetenteco ludos ĉi-tie gravan rolon kaj la sinoptika gramatika tabelo devos esti fidinda gvidilo adaptita al la gepatra lingvo de la uzanto. En gvidilo por Angloj, ekzemple, devas stari noto ke oni ne subkomprenu la rilatpronomon en frazosegmentoj kiel *the book I bought*. Mi ne aŭdacus aserti ke tia entrepreno eblus en la kazo de lingvoj ege malsimilaj al Esperanto, kiel ekz.

la hungara aŭ al japana. Mi ellaboris provojn de gvidilo nur por franc-kaj nederlandlingvanoj.

Ĉar la gvidilo estas ege konciza, ĝi alcelas nur homojn sufiĉe klerajn por distingi infinitivojn, adverbojn ktp. Ĉiakaze necesos 30- ĝis 60-minuta enkonduko por komenti la ĉefajn trajtojn de la sistemo.

Notindas ankaŭ ke tia enkondigo estas pli facila se temas pri la esprimo de siaj propraj ideoj ol se temas pri traduko de ideoj de aliulo aŭ pri dekodigo, ĉar en tiuj kazoj oni ne povas sekvi sian propran pens-manieron.

La uzebleco de la gvidilo estas do iom limigita al:
(a) pli malpli kleraj parolantoj de (prefere?) hindeŭropa lingvo,
(b) esprimante skribe
(c) siajn proprajn mesaĝojn.

Malgraŭ tiaj limigoj mi opinias ke tiu ĉi eksperimento estas unikaĵo en la kampo de aplikata lingvistiko kaj ke valoras la penon, ĝin pre-zenti al pli larĝa publiko. Ĝian fidindecon cetere, oni devus ankoraŭ testi sur pli granda nombro da provpersonoj. Se la sistemo montriĝus uzebla, mi imagas ke i.a. scienculoj, teknikistoj kaj komercistoj povus trovi interesa komunikilon riĉan kaj nuancan kiun ili povas skribe regi post minumuma temp-investo.

Jen do ĉi-poste la enkodigo-gvidilo, esceptokaze prezentita ĉi-tie en Esperanto:

ENKODIGO-GVIDILO

Helpe de tiu ĉi gvidilo kaj de bona vortaro vi skribos senerare en Esperanto post 30-60 minutoj da studado! — Metodo: serĉu en la vortaro la deziratan vorton. Notu la trovitan radikon kaj serĉu en la gvidilo kiun finaĵon vi devas aldoni.

Verbo

futuro	-os
imperativo	-u
infinitivo	-i
kondicionalo	-us
	(same por la kondiĉo kiel por la konsekvenco)
kongrueco de tempoj	precipe ĉe traduko de kondicionalo aŭ konjunktivo, ne sekvi la naci-lingvan kongruecon, sed uzi la ĉi-tieajn indikojn
konjunktivo	se deziro, ordono, espero: -u alikaze: indikativo
kunmetitaj tempoj	laŭeble uzu simplajn tempojn! se necese, kombinu el suba tabelo:

		Aktivo	*Pasivo*
EST	i	help inta	help ita
	is	anta	ata
	as	onta	ota
	us		
	u		

participo	vidu tabelon "kunmetitaj tempoj"
paseo	por ĉiuj tempoj de la paseo: -is
pasivo	vidu kunmetitajn tempojn
prezenco	-as

Ne-verbo

adjektivo	-a, -an, -aj aŭ -ajn (vd substantivon)
adverbo	se derivaĵo: -e / se ne: + Ø
akordo	en ĉiu komplemento senprepozicia, adjektivoj, substantivoj kaj iuj korelativoj (vidu vortaron) alprenas -n kiel markon de la komplemento kaj -j kiel markon de pluralo
apozicio	akordo laŭ nombro kaj kazo kun la ĉefvorto
artikolo	difina: *la* (singularo kaj pluralo) nedifina: Ø
demando	ĉiam komenciĝas per demanda vorto: korelativo aŭ "ĉu".

	Iuj korelativoj		*Adjektivo*		*Substantivo*	
substantivo	*sg.*	*pl.*	*sg.*	*pl.*	*sg.*	*pl.*
komplemento senprepozicia aŭ por signi almovon se la prepozicio tion ne faras:	-N	-JN	-AN	-AJN	-ON	-OJN
alikaze	–	-J	-A	-AJ	-O	-OJ

La adreso de la aŭtoro: Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal

Lingvistiko

LA PROBLEMO DE DUARANGAJ DERIVAĴOJ

Christer O. KISELMAN

1. Enkonduko

Unu el la ĉefaj ecoj de Esperanto estas la libera kaj regula formado de unu vorto el aliaj, ĉu per rekta derivo de la tipo *skribi → skriba*, ĉu per afiksado (*porti → portebla*), ĉu per kunmeto (*presi, erari → preso, eraro → preseraro*). En multaj lingvoj ne al ĉiu adjektivo, ekzemple, respondas adverbo, kaj se jes, ĉi-lasta estas formita laŭ diversaj metodoj. La eblecon transiri de unu vortklaso al alia mi opinias esenca parto de Esperanto. Kaj sekve, reciproke, se la vortformado ne fluas glate en iu kazo, tio signifas malforton ĝuste sur kampo kie Esperanto devus esti forta; ne temas pri problemo flanka sed kerna kaj atentinda. En la jena artikolo mi memorigas pri problemo kiun traktis Wüster kaj kiun mi opinias ankoraŭ aktuala: manko en la derivsistemo de Esperanto. Mi ankaŭ pridiskutos kelkajn solvojn de la problemo, inklude la proponojn de Wüster mem.

2. La gramatika karaktero de radikoj kaj la deriva sistemo

Por la analizo de tiu ĉi artikolo ni povas diri ke la vortoj de Esperanto konsistas el kombinaĵoj de radikoj (*arb, ruĝ, hered*), afiksoj (*ek, ig, ebl*) kaj gramatikaj finaĵoj (*o, a, i, us*). Sed ĉiu vorto ankaŭ havas historion en sia estiĝo, ĉar unu ekestas post alia, pere de alia. La vortoj *tragedio* kaj *tragedia* ne estiĝas samtempe en la lingvo, ĉar el la "internaciaj"vortoj,en la kazo de la franca eldono de la unua libro *tragédie* kaj *tragédique,* oni elektis unu kaj poste formis la aliajn laŭ la reguloj de la internacia lingvo mem (Zamenhof 1887:48). Do *tragedia* estas derivita de *tragedio,* estiĝas nur pere de *tragedio.*

Simile, adjektivoj kiel *granda* kaj *landa* ne estas egalaj el vortiga vidpunkto, ĉar la unua estas primara, primitiva, origina aŭ elira, la dua male derivita de la substantivo *lando*. Ni do bezonas adicii al la vortoj kroman informon, kaj tiun ĉi oni povas teni en la memoro laŭ du manieroj: aŭ oni memoras la transformon *lando → landa,* aŭ oni memoras ke la radiko *land'* havas substantivan karakteron. Tiuj du esprimoj estas tute egalvaloraj laŭ informenhavo; se radiko **x** havas substantivan karakteron, tiam la vorto **xo** estas elira substantivo, kaj, inverse, se la vorto **xo** estas elira, tiam la radiko **x** havas substantivan karakteron. La du manieroj priskribi la vortfaradon (*Aktoj de la Akademio* 1963-1967, pĝ. 69-70, kaj Szerdahelyi 1976), estas strikte egalvaloraj, almenaŭ kiam temas pri la menciita problemo. Sed depende de la problemo traktota, unu povas montriĝi pli praktika ol la alia. La avantaĝo de la akademia teorio estas ke la derivado okazas kiel adicio de elementoj: el *hom* kaj *a* oni formas *homa* per apudmeto, dum en la alia okazas unue ia subtraho: el *homo* oni unue formas la nudan radikon **for**prenante la finaĵon, kaj poste oni aldonas la adjektivan finaĵon:

homo → hom → homa.

Dum momenteto la vorto ne estas vorto, kvazaŭ veturilo kiu ne povas funkcii dum ŝanĝo de radoj. La operacio en tiu dua kazo do estas iom pli komplika, sed, aliflanke, estas pli facile apliki ĝin plurfoje, kaj ĝuste ĉar mia temo estas la pluformado, mi elektis tiun manieron de prezentado. Sed ĉiu leganto kiu deziros priskribon en la alia maniero, uzante do la gramatikajn karakterojn de la radikoj, povos facile reskribi la tuton. Nek la problemoj traktotaj, nek iliaj eventualaj solvoj dependas de la maniero de prezentado.

3. Mallonga notado de transformoj

Ĉar mi traktos derivojn de la formo

homo → hom → homa → hom → homeco

mi enkonduku iom malpli longan notadmanieron por ili. La transformon *homo → hom → homa* mi skribos *homōa*. Ĉi tie la simbolo $\bar{o}$ signifas ke oni forstrekas la antaŭstarantan literon o; la simbolo $\bar{o}$ ne estas litero de Esperanto; tute male, ĝi estas ia mallitero kiu neniigas la literon *o*. Kaj *homōa* neniel estas vorto; ĝi estas transformo de vortoj, de *homo* al *homa*. Pli ĝenerale mi skribos nur *ōa* por la transformo *o →* *a*. (Voĉlegante oni povas prononci *homōa* kiel "homo, o for, a" aŭ "homo, mal-o, a".)

Leganto (eĉ pli) matematikema povos skribi la malliteron $\bar{o}$ kiel o^{-1}; do $oo^{-1} = \emptyset$, la malplena litero. Tiel la finaĵoj kaj malfinaĵoj fariĝas kvazaŭ malgranda algebro.

o!
o'

Simile *īebla* estas la transformo *i → ebla,* aplikebla al transiraj verboj kaj kelkaj netransiraj. La transformo *īebla* enhavas multe pli da informo ol la nura sufikso *ebl,* kie ne estas indikite ke ĝi estas alverba sufikso adjektiva. Ŝajnas ke ekzistas du iom malsamsencaj transformoj *īigi* kaj *āigi* (ekzemploj: *bruli → bruligi,* respektive *pura → purigi*); same *īiĝi* kaj *āiĝi* (ekzemploj: *sidi → sidiĝi* kaj *pala → paliĝi*).

Sed leganto kiu ne ŝatas tian notadmetodon de la transformoj povos facile reskribi la sekvaĵon, ne uzante ĝin. Tamen la ekonomieco de la mallonga notado kredeble estos pli persvada kiam oni alvenos al kunligitaj transformoj.

4. La pluformado — kunligitaj transformoj

Ni povas nun diri ke Esperanto konsistas el eliraj (primitivaj) vortoj, ekzemple *homo, ŝtono; bela, blua; nepre, prunte; kuri, skribi,* kaj transformoj kiaj *ōa, ōe, ōi; āo, āe, āi; ēo, ēa, ēi; īo, īa, īe.* Se oni aplikas tiajn transformojn al la eliraj vortoj, oni ekhavas aliajn vortojn: *ŝtona, home, homi; belo, bele, blui; prunto, nepra, nepri; kuro, skriba, kure.* Ili estu nomitaj la unuarangaj derivaĵoj. Sed ili ja estas vortoj, kaj oni kompreneble volas ripeti la derivadon, t.e. kunligi la transformojn:

homo → homa → home
skribi → skribe → skriba

aŭ, kun la mallonga notadsistemo: *homoōaāe, skribiīeēa.* Ni povas nun rimarkigi ke la rezultoj de la transformoj *ōaāe, īaāe* laŭsignife egalas al tiuj de *ōe, īe.* Tiu fakto permesas al ni flankenlasi la adverban finaĵon *e*; ne ĉar ĝi "estas propre adjektivo kun alia gramatika rolo" (AA I, pĝ. 63), sed ĉar ĝi ĉiam estos traktebla pere de *āe* kaj *ēa*; t.e. ne gravas ĉu oni konsideras *skribe* kiel derivaĵo de *skribi* aŭ de *skriba.* Do *skribe* kiel duaranga derivaĵo de *skribi* (la rezulto de *skribiīaāe*) egalvaloras al *skribe* kiel unuaranga derivaĵo de *skribi* (la rezulto de *skribiīe*). Sed se iu malkovros iun diferencon inter *ōe* kaj *ōaāe,* facilas aldone analizi tion, uzante la saman notadmanieron.

Se oni aplikas la transformon *āo* (kiel en *rapida → rapido*) al la adjektivo *homa,* oni ne povas realigi la rezulton kiel *homo* (ĉar *homa* ja estas derivita de *homo*), sed kiel *homeco.* Ni do povas diri ke la rezulto de la transformo *homoōaāo* estas *homeco,* aŭ ĝenerale, ke la kunligo *ōaāo* de la du transformoj *āo* kaj *ōa* realiĝas kiel *ōeco.* Analoge, la rezulto de la transformo *telefonoōiīo* realiĝas kiel *telefonado,* do *ōiīo* realiĝas kiel *ōado.* Esprimite iom aliel, primitivaj adjektivoj permesas la transformon *a → o,* kiel *bela → belo,* kaj primitivaj substantivoj permesas la transformon *urbo → urba,* sed la kunligo estu *urbo → urba → urbeco*; same la modeloj *martelo → marteli* kaj *kuri → kuro* donas la kunligon *martelo → marteli → martelado.* Do Esperanto disponas je specialaj sufiksoj kiuj permesas ĝuste la realigon de kunligoj de transformoj. Sed ne de ĉiuj. Kiel realigi en Esperanto la rezulton de la transformo *āoōa*? Ĝuste tiun demandis traktis Wüster.

5. Metodoj realigi la aplikon de la transformo *ōa* al neprimitiva substantivo

Ni do rigardu kiel oni realigas la rezulton de la kunligo de la du transformoj *āo* kaj *ōa.* Ekzemplo de la unue menciita estas *varma → varmo,* ekzemplo de la dua estas *ligno → ligna,* ambaŭ oftegaj transformoj. La rezulto de la transformoj *varmaāoōa, fortaāoōa* devas

signifi "rilata al varmo", "rilata al forto". Kion do oni faras? Antaŭ ol provi respondi, ni iom pliĝeneraligu la problemon.

Oni bezonas apliki la transformon *ōa* ne nur al substantivoj kiel *varmo, forto,* derivitaj de adjektivoj *varma, forta,* sed ankaŭ al kelkaj aliaj derivitaj substantivoj, plej notinde de la tipo *unuo,* derivita de *unu* (la transformo en tiu ĉi kazo estas tutsimple *o,* sen iu mallitero). La iom pli ĝenerala demando do estas: kiel realigi la rezulton de la transformo *ōa* aplikita al derivita substantivo? Ni pritraktos la jenajn sep eblojn:

A. **Ignoro.** – Oni tutsimple realigas *āoōa* kiel Ø. Tiu povus aperi ŝoka, same kiel oni dirus *homo anstataŭ homeco* kaj *telefono* anstataŭ *telefonado.* Sed tiu simpla solvo de la problemo fakte estas ofta, kaj ofte akceptita. Ekzemplo: *Esperanta vortfarado.* Ĉi tie *Esperanta* signifas "rilata al Esperanto"; "Esperanto" estas tiom ofta substantivo ke ĝi sentiĝas kiel primitiva, kaj sekve "Esperanta" aperas kiel unuaranga derivaĵo. Alia ekzemplo estas *konveksa analitiko* (la analitiko pri konvekseco), kaj pri multaj tiaj nomoj klaras ke la scienco mem ne havas la econ, sed pritraktas iun fenomenon rilatan al la menciita eco. Mi foje diris "prezidanta martelo" por la martelo de prezidanto.

B. **La analiza formo.** – Ekzemploj: *energio de varmo, efiko de forto, mezurilo de rapido, aro de konverĝo* (la aro ne estas konverĝa, sed konsistas el punktoj kies serio estas konverĝa), *bulo de unuo, ringo kun unuo, kunfaldo de infro.*

C. **Kunmeto.** – Ekzemploj: *varmoenergio, fortefiko, rapidomezurilo, konverĝoaro, unubulo, infrokunfaldo.*

Ĉ. **Fremdaj vortoj.** – Oni realigas la rezulton de *varmaāoōa* kiel *termika,* tute nova vorto, iom fremda aŭ "internacia"; same oni enkondukis en EKV la vorton *unito,* anstataŭ *unuo* por povi diri *unita ringo* por *unuhava ringo* aŭ *unuiza ringo, unita bulo* por *bulo de unuo.* La nova vorto estas primitiva, kaj ĝiaj unuarangaj derivaĵoj estas tradukoj de duarangaj derivaĵoj de pli origina vorto.

D. Specialaj sufiksoj. – Oni povas diri ekzemple *unuiza ringo* por "ringo kun unuo", uzante la teknikan sufikson *iz* (la transformo *ōizi*). Pli precize, *unuiza* estas la rezulto de la transformo *unuoōizīa*. "Unuizita ringo" estas ringo kiun oni provizis per unuo, sed "unuiza ringo" iom liberiĝis de tiu ideo. Same ekzistas ia delikata diferenco inter *norma spaco, normiza spaco* kaj *normizita spaco* kiujn oni eble povus utiligi, sed ne sen antaŭ difino en apuda teksto.

E. Realigo de *āoōa* kiel *āoa*. – Tiu solvo konsistas el la konservo de la finaĵa vokalo *o*. Ekzemple, *varmoa* signifus "rilata al varmo"; same *unuoa* "kun unuo", kaj analoge *vidia* "rilata al la ago vidi", *fiŝiema* "ema fiŝi". Derivitaj adjektivoj kiel *ligna, ŝtona* do aperus kiel simpligoj de iuj teoriaj *lignoa, ŝtonoa*.

F. Ĝeneralaj sufiksoj – Tiu lasta ebleco estas la propono de Eugen Wüster (kvankam li skribis "Ni volas rilate tion fari neniajn proponojn" [Wüster 1978:39]). Sed poste "en la unua loko inter la proponeblaj sufiksoj sin rangas la rusa -ov-" [1978:40]. Do gustumu: *varmala energio, rapidova mezurilo, unuala ringo, unuova ringo.* Wüster 1978:27-43 estas represo de artikolo el 1921; dek jarojn poste, en «Internacia lingvo-normigo en la tekniko» ... de 1931, represita kiel Wüster 1978:137-202, el kiu mi citas, li faras aliajn proponojn, nome -on-, -om-, -or- por la pluformado de substantivoj, -al-, -am- por adjektivoj, kaj -ir-, -im- por verboj. En ĉiuj kazoj li do konservas la finvokalon kaj intermetas konsonanton inter la malnova finaĵo kaj la nova. Ni do havus *varmo → varmora, rapidona mezurilo, fortona efiko, konverĝoma aro, holomorfova regiono, holomorfora regiono, unuora ringo.* Alivorte, la transformo *āoōa* realiĝus kiel *āova, āona, āoma, āora*. Kun -ir- oni havus ekzemple:

martelo → marteli
marteliro (unufoja martelbato)
martelado (daŭra aŭ ripeta uzo de martelo)

Do *-iro* estus pli-malpli kiel *-ado*, sed sen ties rememorigo pri daŭro. Analoge *-al-* servus en ekzemple *ŝtataligi* (igi ŝtata), ĉar *ŝtatigi* por Wüster signifas "igi ŝtato"; nun oni konvencie interpretas *ŝtatigi* kiel

"igi ŝtata", kaj ni anstataŭ eble bezonas *ŝtatonigi, ŝtatorigi* por "igi ŝtato". Klaras ke la sufiksoj *al, am, ir, im* estas malpli bezonataj ol *on, om, or,* kaj pro tio mi limigas min al la problemo menciita.

6. Komentoj pri la sep metodoj de realigo de la transformo *ōa*

A. Ignoro – Tiu ĉi estas eble la plej eleganta, plej esperanta (tiel!) el la sep metodoj. Ĝi implicas plivastigon de la senco de adjektivo. Se mi diras "En mia aŭto mi havas tri mezurilojn: distancan, bezinan kaj rapidan", la aŭskultanto kredeble komprenas ke en la aŭto estas rapidmezurilo. Tamen, en la teknika lingvo *rapida mezurilo* povas signifi nur "rapide funkcianta mezurilo". Notu ankaŭ la serion: "Mi prelegis esperantlingve", "Mi prelegis esperante", "Mi prelegis esperante ke mi finos antaŭ la deka". Do tamen tiu solvo estas tro aŭdaca kaj precipe en pli teknika lingvo ĝi ne taŭgas.

B/C. La analiza formo; kunmeto – Tiuj metodoj donas tute precizajn vortojn, sed ili kondukas nin al tro pezaj formoj; ofte mankas eleganteco. *Rapidmezurilo* aŭ *mezurilo de rapido* ne estas malbonaj en si mem, sed memoru ke oni en la tekniko bezonas amasigon de determiniloj: oni tiam prefere ludu kaj kun adjektivoj, kunmetitaj vortoj kaj kun determiniloj per prepozicioj.

Ĉ. Fremdaj vortoj – Tiu deekstera solvo estas ofte facila, ĉar abundas vortoj uzeblaj en la teknika lingvo. Sed ĝi estas kvazaŭ kapitulacio, ĉar se oni aplikas ĝin, oni ekhavas du vortojn por unu nocio. La vortfarado estos tute malregula, kaj unu el la ĉefaj ecoj de Esperanto estos perdita. En letero de 1986-03-09 Werner Bormann skribas: "Proponi *unito* anstataŭ *unuo* (ĉar malpli taŭga por pluformado) estas por mi simpla signo de aroganteco antaŭ la lingvo". Kredeble tio validas ankaŭ por multaj aliaj nove enkondukitaj teknikaj vortoj. La fenomeno montras, miaopinie, ke la lingva evoluo sekvas la plej facilan vojon, kaj tiu ĉi metodo (Ĉ) estas, kiel jam dirite, facila.

D. **Specialaj sufiksoj** – Ĉiu speciala sufikso havas nevastan kampon de apliko, limigitan de la signifoj. Ke semantikaj rilatoj regas la vortfaradon estas oftaĵo en Esperanto (en ĉiu lingvo). Tiu ĉi metodo tamen verŝajne ne estus bezonata se oni havus solvon laŭ metodo (F). Ĉiuokaze ne ekzistas sufiĉe da specialaj sufiksoj por solvi pli ol parteton de la problemo.

E. **Konservo de la finaĵo -o** – Tiu solvo estis uzata kelkfoje. Sed la derivoj *varmo → varmoa, rapido → rapidoa* aperas kiel tre kontraŭaj al la vere bazaj *homo → homa, ŝtato → ŝtata*. Krome la renkontiĝo de la vokaloj ne plaĉas.

F. **Ĝeneralaj sufiksoj** – Wüster atentigis ke -on- estas jam uzata por frakcioj. Do *unuona ringo, unuona bulo* memorigas pri *duono, triono...* kaj povas esti iom konfuzaj. Sed el la kvin *-al-, -ov-, -on-, -om-, -or-* ĝi ŝajnas al mi la malplej peza.

7. Konkludo

Pri la propono de Wüster la aŭtoroj de PAG skribas ke ĝi estas "teorie perfekta, sed praktike senŝanca; ĉi-lastan konstaton de tiam pravigis la tempo" (PAG:522). La Wüster-an proponon ili nomas matematike esotera; la ordinara homo apenaŭ akceptas tian sufikson. Ni tamen memoru ke la ordinara homo opinias la tutan Esperanton matematike esotera.

La problemo de duarangaj derivaĵoj ne estas tre sentata en la ĉiutaga lingvo. Ĝi tamen gravas en la teknika kaj scienca lingvo. Ĝuste pro tio, estas penseble ke oni havus solvon kiu funkcios ĉefe en la teknika lingvo. Kompreneble Esperanto povas funkcii kun la metodoj B, C kaj D; ĝi jam funkcias. Sed tiuj solvoj estas malpli elegantaj ol la solvo F. Kaj beleco gravas.

Estas miaopinie dezirinde havi simplan, rektan, unuecan metodon derivi adjektivon de neprimitiva substantivo, ĉar tia estu Esperanto.

5.3. Per "**adamistoj**" aperas en interlingvistiko la mistika kurento, anstataŭanta la kreivan potencon de la racio per rekonstruado de iu hipoteza, perfekta pralingvo. La mistikistoj komparas la kondiĉanta(j)n antaŭ-lingvo(j)n kun la kondiĉita(j) post-lingvo(j), uzante mimetismajn-Kratilismajn operaciojn, surbaze de la "regresiva perfekteca" principo, t.e. ju pli malnova estas iu lingvo, des pli perfekta ĝi estas.

5.3.1. Laŭ FIRTH tiu monogeneza-adamisma penso estas heredaĵo de la Jud-Kristana koncepto: *"the one-language-ideal, a heritage of Judeo-Christian revelation, and bound up with a Judaeo-Christian philosophy of life"*. Kaj fakte, en la Biblio troviĝas pluraj "lingvistikaj eseetoj" kaj en la Malnova, kaj en la Nova Testamentoj. En la Malnova — la jam menciita [§ 5.2.] Babela legendo [Genezo XI.1.6-9], la post-diluva lingvosituacio [kp. la filoj de Noah: Ŝem, Ĥam kaj Jafet = la tri grandaj lingvo-familioj, en Gen: 9] kaj en la Nova Testamento la Pentekosta miraklo [Faroj de la Apostoloj, II.3-4]. Tiu "lingvistika materialo" dum longaj jarcentoj nutris kaj influis la lingvistikan pensmanieron ne nur de teologoj, sed ankaŭ tiun de filozofoj.

5.3.2. En **Renesanco** la nostalgio pri la perdita Paradizo vekas la deziron reserĉi la paradizan lingvon. Por la Renesanca homo Adamo estas la simbolo de la komenco. La "unu-o" estas kvazaŭ sinonimo de "perfekto", la "plu-o" — tiu de "neperfekto". La plurismo estas la degradigo de la unueco. La kulto de "unuo" transiras en la kulton de la "unua", poste ili interplektiĝas: *"Unicum autem initio fuisse in toto genere hominum sermonem, sicut unica est ratio, cogruit societati arctissimæ et mutuæ opi"* [BIBLIANDER, 1548].

5.3.3. Estas necese ripeti [kp. § 5.2.] kaj emfazi, ke laŭ Biblio ne Dio, sed Adamo donis nomon al la kreitaĵoj. Dio donis al la homo nur la kapablon paroli (*ton logon dynamis*). La lingvo nur *"in potentia"* estas Dia kreitaĵo, sed *"in actu"* ĝi estas rezulto de libera homa kreivo.

5.3.4. Se la teorio pri unueco de *"sermo primogenitus"* estis ĝenerale akceptita, al la demando. "Kiu estis tiu unua, tuthomara, perfekta, natura lingvo?" la respondoj jam diverĝas. Ili estas grupigeblaj en du grandajn grupojn:

(a) iu natura lingvo, kiu post Babelo estis disipita en la partikularajn lingvojn;

(b) iu (sankta) pra-lingvo, ekz. la Hebrea, Ĉina, Kelta aŭ kiu ajn alia.

Por demonstri la elekton oni uzis fantaziajn etimologiadojn, klopodante pruvi la adekvatecon inter la signo (vorto) kaj ĝia signifo. La plej multajn adeptojn havis la Hebrea, ĉar la Kablistoj sukcesis demonstri per mistikaj manipuladoj la prasignifon de Hebreaj literoj/sonoj. La etimologiadoj kondukis la 'esploristojn' ĝis la plej ekstremaj limoj: al la 'malkovro' de la t.n. "naturaj sonoj", al la son- kaj liter-mistikismo.

5.3.4. La adamistoj rifutas la (nuntempe ĝenerale akceptitan) teorion, laŭ kiu la homa racio formis la artikigitan lingvon senigante la sonojn de ilia eidetika funkcio. t.e. forigante iliajn ŝajnsignifojn kaj el tiuj semantike vakuaj sonoj formis la morfemojn kaj/aŭ vortojn. Laŭ adamistoj la homaj parolstonoj havas naturan-logikan valoron kaj ekzakte fikseblan geometrian-spacan formon. Sekve — laŭ ili — la sonoj estas ideokonstruaj, konstituivaj elementoj de la lingvo. La parolsonoj laŭ ilia natura signifo kaj akustika substanco estas taŭgaj, por logike konstrui nociojn. Sekve: se oni sukcesas difini la rilaton inter la akustika valoro de iu sono kaj ĝia 'signifo' kaj se oni sukcesas konstrui al ĝi adekvatan grafikan signaron, evidentiĝos, ke ĉiuj partikularaj lingvoj elkreskis el la sama, unusola, natura pralingvo, en kiu la vortoj ne estis arbitraj kaj konvenciaj, sed rekte spegulis la realaĵerojn.

6.1. La **ideo-mimofonismo**, t.e. la teorio, laŭ kiu ĉiu son-elemento havas semantikan valoron, komenciĝas verŝajne ĉe PLATONO, sed detale ĝi estis prilaborita far John WALLIS (1616-1703). Ĝi konsistigas signifan elementon de universala-lingva modelo ĉe M. MERSENNE kaj

COMENIUS. Mem LEIBNIZ okupiĝis pri la analogio inter la perceptado/sono kaj sono/ideo. Laŭ li oni devas trovi la sonojn, kiuj en ĉiuj lingvoj portas la saman semantikan valoron, kolekti ilin kaj pere de ili rekonstrui la pra-radikon. La ideo reaperas dum la Franca Klerismo kaj Enciklopediismo, generante plurajn lingvo-modelojn, baziĝantaj sur tiu principo. M.V. LOMONOSOV (1711-1765) tre serioze okupiĝis pri sonsimbolismo. Sub lia influo prilaboris D.N. ĈERNUŜENKO planon de universala lingvo, baziĝanta sur la 'naturaj sonoj' (1890).

6.2. La **fono-mimografismo** baziĝas sur la hipotezo, ke inter la formo de la litero kaj la akustikaj parametroj de la sono estas senpera rilato (certagrade tiun principon sekvas la t.n. organikaj alfabetoj). La penso — en serioza formo — aperas unue (verŝajne) ĉe J.C. SCALIGER (1559); ĝia fundamenta verko *"Naturæ et scripturæ concordia"* aperis en Leipzig, en 1752, verkita de J.G. WACHTER (1673-1757). La plej konataj artefaritaj lingvoprojektoj, aplikantaj tiun teorion, estas la strangaj verkoj de Rowland JONES (1722-1774). Laŭ lia teorio, la pralingvo de la homaro estis ia sintezo de la Hebrea kaj Kelta kaj ties moderna varianto estas la Angla. Tial al la rekonstruo (*restauration/instauration*) de la pralingvo la plej firman bazon donas la Angla lingvo. Por havi imagon pri la metodo, jen specimeno:

O – estas la simbolo de fermita/senfina/eterna cirklo. Ĝia signifo: spaco kaj tempo, la universo, de kie: suno; el tio: movo, varmo, lumo.

I – la vertikalo, etendiĝanta al senfino; super ĝi la punkto prezentas la sunon. Ĝi estas la simbolo de la fajro kaj kolero. Signifas ankoraŭ starantan homon kaj la pronomon "mi" [kp. Angla *I*].

L – konsistas el vertikalo kaj horizontalo; de tie ĝia signifo: spaco, etendiĝo, vasteco.

OL – signifas "terspacon", t.e. la kosmon [kp. Angla *all, whole*].

Konklude

Estas konstateble, ke la aŭtoroj de artefaritaj lingvoplanoj erarvagadis ankaŭ sur tre malfirmaj, nesekuraj kaj danĝeraj terenoj. Iliaj verkoj estas fantaziaj, pseŭdosciencaj. La adamismaj, son- kaj liter-simbolismaj projektoj apartenas al la kuriozaĵoj, kiuj montras kiajn monstraĵojn povas generi erara koncepto.

F. DE SAUSSURE kategorie deklaras: *"l'institution du langage ne découle pas, depuis l'origine, d'une harmonie visible entre l'idée et le moyen d'expression"*. Koncize tiel rifutas la lingvoscienco ĉiujn provojn rekonstrui la perfektan pralingvon de la homaro, la "veran naturan pralingvon", pri kies iama ekzisto la scienco forte dubas, eĉ konsideras ĝin absurdaĵo.

7. Utopio – uglosio

La mito esploras la originon, la utopio — la futuron. La *"u-topos"* estas la "neni-lando", la *"u-glossa"* — la "neni-lingvo". Anstataŭ la Paradizo en la romanoj aperas la *"Terra Incognita"*: landoj, imperioj situantaj ie ekster nia planedo en la kosmo.

7.1. Cyrano DE BERGERAC (1649-1656) sur la Luno, kiel Mada, renkontiĝas kun Adamo kaj la profeto Elija. La Lunanoj parolas du lingvojn: la artistokratio muzikan lingvon, la popolo — gestan lingvon, sed ambaŭ estas kompreneblaj por ĉiuj. Sur la Suno (1652/1662) la nuda hometo, sidanta sur ŝtono parolas jam la perfektan naturan lingvon: la vojaĝanto, kiu neniam antaŭe aŭdis tiun lingvon, laŭvorte komprenas ĉion, kion la hometo diras.

Referencoj:
Aktoj de la Akademio I
EK-Vortaro
Kalocsay & Waringhien. 1980. PAG
Szerdahelyi, István. 1976.
Wüster, Eugen. 1978.
Zamenhof, L. 1887

Adreso de la aŭtoro: Upsala universitato, Matematika instituto, Thunbergsvägen 3, S-752 38 Uppsala, Svedujo.

Metodiko

LA ESPLOR-KREIVA VOJO: KIEN ĜI KONDUKAS ?

Oene HOEKSTRA

En multaj lokoj en la mondo jam dum jardekoj evoluas novaj vojoj por metodologio de fremdlingva instruado. Ju pli rapide kaj komforte la teknologio ebligas vojaĝi de unu kontinento al alia, des pli urĝas la studo de fremdlingvoj. Des pli urĝas la evoluado de metodiko por pli efike lerni kaj regi plurajn fremdlingvojn. Multaj famaj sciencistoj okupis sin pri tio. Ankaŭ D-ro *Wil Knibbeler* el Nijmegen faris tion. Li pristudis la verkojn de multaj edukistoj kaj lingvistoj, tiel esplorante li malkovris, ke kelkaj vere revoluciaj metodikistoj tute ne estas lingvistoj. Prof. *Gattegne,* la verkinto de la "Silenta Vojo", Prof. *Lozanov,* la iniciatinto de la "Sugestopedio" serĉis eblojn, per kiuj lernantoj pli facile kaj komforte lernu la materialon kiun ili deziras kaj poste ili okupiĝis pri lingvoj. Krome la "kolektiva Lingvo-Lernado" kaj la "Kunflua Instruado" de *Curran* kaj *Galyan* estis la plej gravaj bazoj el kiu kreskis "La Esplor-Kreiva Vojo".

Gravaj diferencoj inter tiu ĉi kaj aliaj metodikoj estas:

a) Ekde la unua momento oni komunikas en la cel-lingvo.
b) La iniciato estas plej grandparte ĉe la lernantoj.
c) La instruisto ne prezentas programitan materialon, nur erojn.
ĉ) La lernantoj esploru la erojn kaj el tiuj ili kreu tekston.
d) La tasko de la instruisto estas nur stimuli la lernantojn, tiel ke ili esplorante kaj kreante havu la impreson ke ili jam multe scias kaj povas. Nur, se necese, la instruisto zorgu ke la lernantoj ne perdu la vojon.
e) La materialo por la kurso por komencantoj konsistas nur el kartoj kun vortoj kaj vortradikoj kaj la necesaj afiksoj. La gramatikaĵojn

mi kolorigis. Tio estas avantaĝo de Esperanto, ĉar en la nacilingvaj kursoj oni bezonas la kolorojn por montri la fonemojn.

Ĝis nun mi instruis en kvintagaj kursoj en la *Universitato de Nijmegen.* Tiel ne eblis finstudi la tutan 22-folian materialon nek specialajn temo-foliojn. Verki materialon por daŭriga kurso ni volonte faros kune kun aliaj gekolegoj kiuj montros intereson por la "Vojo". La plej bonaj lernantoj estas gejunuloj, kiuj lernis jam minimume unu fremdan lingvon, ne Esperanton.

Se vi interesiĝas, bonvolu sciigi tion; d-ro *Knibbeler* kaj mi estas je dispono por ampleksa informado.

Ampleksa broŝuro estas senpage havebla, ĉe:
"Esperanto 100", Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando.

P.S. – En 1987 aperos la libro de d-ro *Knibbeler* en kiu li detale priskribas la metodikon kaj la rezultojn de la esploroj, kiujn li faris. [En la angla lingvo]

Retrospegulo

DOKUMENTO EL PRATEMPOJ

Gyuala Baghy

Szinházi Ujság (Teatra Gazeto), *Kassa*, 3a jarkolekto, n-ro 31-32; 1914, de la 2a ĝis la 13a de Majo.
[N-ro H 9.051 (1913-1914) en la katalogo de *OSZK* – Tutlanda Biblioteko «Széchényi»]


En tiu ĉi maldika figuro, malantaŭ tiuj okuloj de granda fajro, profunda nigro, loĝas spirito de forta scio, granda volo kaj multaj planoj.

Kiel aktoro, li havas kunnaskiĝintan, Di-benitan talenton. Kiel karakterkomikisto li estas unuaranga figuranto. Liaj maskoj estas ĉiam ĝustaj, neniam li troigas, neniam li estas klaŭno! Liaj prezentaĵoj venas el lia animo de varmaj sentoj kaj idealismo, kaj ĝuste tial ili estas neforgeseble intimaj. Li estas hejme en ĉiuj branĉoj de la humura rolaro. Samkiel negra ĵig-dancisto aŭ seka profesoro, li scipovas esti ruza ĉino aŭ majesta judo; se necese, li leviĝas ĝis drama forto kaj enpensigas, kortuŝas per siaj figuroj konstruitaj sur reala observo.

Kiu parolis kun li eĉ nur unu fojon, tiu tuj ekvidas en li la personon entuziasmiĝantan pri ĉio bona. Kiel privatulo li vivas en retiriĝo inter siaj libroj, kaj estas entuziasma apostolo de la mondlingvo Esperanto; konekse kun tio sindona adepto, batalanto de la mondpaco kaj homamo. Li kroĉiĝas per la tuta varmo de sia animo al la feliĉo de sia eta familio kaj al la edukado de sia infano.

Ni antaŭdiras al li grandan estontecon sur ĉiuj terenoj, kaj ni certas, ke la publiko en Buda kaj Temesvár ekamos lin same tiel varme, kie lin amis lia kara publiko en Kassa; ĉar por li la scenejo estas preĝejo, kaj la scienco-sanktejo.

(Tradukis: Adalberto Huleŝ. Mem la artikoleto estas anonima.)



Perfektigo de Pedagogoj

LA UNUA GENERACIO DE "OFICIALAJ" ESPERANTO-INSTRUISTOJ EN JUGOSLAVIO

Peter ZLATNAR

La evento por Jugoslavio gravas ne pro sia unuaeco, sed pro la fakto, ke ĝi rezultas el konscie programita kaj insiste, paŝo-post-paŝo realigita celado al t.n. **oficialigo de Esperanto**. En kies kadro estas serĉata *modus vivendi* en konkretaj cirkonstancoj, inter la socia rolo de Esperanto en la lingvopolitika problemaro kaj ĝia lerneja sistemo de fremdlingva instruado kiel parto de lingva problemo en internacia komunikado. La radikoj, el kiuj elkreskis tiu frukto, sidas en antaŭeksperimenta periodo, dum kiu viciĝis: Internaciaj Pedagogiaj Semajnoj kaj Interlernejaj Konferencoj de Krajnska Gora en Beogrado kaj Graz, kiuj siaflanke provokis okazigon de la Pedagogia Didaktika Eksperimento (PDE) kun siaj dek t.n. Mariboraj Kunordigaj Konferencoj inter tri najbaraj landoj, kaj en kunlaboro (almenaŭ en formo de aktivaj observantoj) kun la koncernaj landaj klerigaj ministerioj. Tiu karakteriza fakto senteblas ankaŭ en la tuta posteksperimenta periodo, al kiu apartenas ankaŭ la preparoj por ĵus fininta studprogramo en la Pedagogia Akademio de Ljubljana.

Samkiel tiu ĉi du-semestra studprogramo, kiu ebligas al jam diplomitaj instruistoj aldone specialiĝi ankoraŭ pri la studobjekto "Esperanto", ĝi estas la rezulto de celkonscia pli frua agado. Tiu ĉi startobazo servas kiel nova fakto kaj firma argumento por fari sekvan paŝon al regula studprogramo por preparado de E-instruistoj en elementaj kaj mezgradaj lernejoj, kaj pluen iniciati sciencajn studojn en la universitato. La ĝisnuna, per rezultoj dotita kunlaboro, inter la universitato en Budapeŝto kaj tiu en Ljubljana, instigas kaj pravigas la pluevoluigon kaj preparadon de kondiĉoj por konkreta kunordigita agado de



La Ekzamena Komisiono:
I. Szerdahelyi, S. Tavčar, N. Rašić.

ambaŭlandaj ministerioj sur la kampo de reciproka komunikado kaj sur nivelo de interesiĝo en tiu ĉi lingve tiel eksponita teritorio.

Jen kelkaj detaloj el **la oficiala raporto** al la Dekano de la Pedagogia Akademio kaj al aliaj lernejaj, ŝtataj kaj politikaj instancoj, kiuj kontribuis al efektivigo de tiu programo:

La dusemestra kurso funkciis en la kadro de postdiplomaj, fake kompletigaj programoj por la instruobjekto en Esperanto en la *Pedagogia Akademio de Universitato Edvard Kardelj en Ljubljana.* Surbaze de

leĝo, pri enprogramigo ankaŭ de la internacia lingvo Esperanto en la sistemon de fremdlingva instruado en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj, aperis ankaŭ bezono pri kompetentaj Esperanto-instruistoj.

La Pedagogia Akademio, en kunlaboro kun la Esperanto-Instituto de Ljubljana, preparis la programon laŭ spertoj kaj modelo de la Fako Esperanto — lingvo kaj literaturo — en la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, kaj anoncis komencon de aparta studprogramo por instruistoj, kiuj deziras specialiĝi por instruado de Esperanto. Bedaŭrinde, la programpreparoj kaj precipe la manko de necesaj financaj rimedoj ankoraŭ prokrastis tiun komencon.

La celoj de la studprogramo estas jenaj: science studi esperantologiajn lingvomodelojn, ĝeneralan lingvometodikon, kaj socilingvistikajn problemojn kun aparta konsidero por racia solvo de la internacia lingva problemo.

Anoncis sin dudek kvar kandidatoj: el Slovenio 13, Kroatio 4, Serbio 2, Bosnio kaj Hercegovino 4 kaj Makedonio 1. Tamen plenrajte komencis studon *20 kandidatoj* kiuj pagis la kotizon: el Slovenio 13, Kroatio 5 kaj Serbio 2.

La studon solene komencis la dekano prof. *Ivan Škoflek*; direktoro de la Lerneja Instituto, prof. *Peter Vinkler* deziris inaŭgure sukcesan finan rezulton.

La programo okazis en dek semajnfinaj prelegserioj kaj seminarioj ekzercoj, entute 150 laborhoroj inter la 24-a de novembro 1984 ĝis la 22-a de novembro 1986. La objektivaj cirkonstancoj pro vintraj trafikaj baroj, disponebla tempo de prelegantoj kaj laboro en la lernejo, prokrastis la terminon. Oni devas prikonsideri la fakton, ke prof. *I. Szerdahelyi* kaj prof. *B. Wacha* venadis el Budapeŝto; aliaj prelegantoj, prof. *D. Brozović, Z. Tišljar, Sonja Tavčar* kaj *N. Rašić* kaj la studentoj venadis el aliaj 12 lokoj inter 100 kaj 500 km distance de Ljubljana.



La kursofina manpremo



La finintoj

La studantoj konfirmis sian scion per **kvar kolokvoj** el kvar bazaj studoj: pri analiza gramatiko, esperanta originala kaj traduka literaturoj, pri speciala metodiko, interlingvistiko kaj la historio de la internacia lingvo kaj de ĝia movado. Ili verkis ankaŭ diploman laboraĵon el temoj ankoraŭ nenie prilaboritaj. Estas konstateble, ke la finintoj de la kurso altigis kaj pli profundigis siajn ĝeneralajn kaj aplika-lingvistikajn konojn kaj ricevis firman bazon por science pluevoluigi siajn sciojn.

La planitan programon oni povis efektivigi dank' al komprenema rilato flanke de ambaŭ universitatoj kaj iliaj ŝtataj lernejaj instancoj, kiuj ankaŭ estontece povos esti kun sukceso daŭrigotaj. Ĝenerale **bonaj interŝtataj rilatoj** kreas favoran atmosferon kaj konkretajn eblecojn por kunlaboro, en kiu la interlerneja aktivado povos esti konsidereble priatentata kaj utila.

Krom enlande, la intereso por tia formo de instruista preparado aperis en najbaraj landoj en la kadro de t.n. **regiona komuneco Alpoj-Adrio**. Diverslandaj prelegantoj kaj diverslandaj studantoj estas ja nia specifa karakterizo, kiu vekas ĉiam pli da intereso kaj atentigas pri la socia rolo de Esperanto en kleriga kaj eduka sferoj.

La sukcese finita kurso kiel parto de strategia celado konfirmas ĝian historian valoron kaj perspektivigas pluan celkonscian agadon precipe enlande kun respektiva kunordigita agado en regiona kaj monda kadroj.

Adreso de la aŭtoro: Ljubljana, Rimska 7, Jugoslavio.

Raporto

LA KVARA INTERNACIA METODIKA SEMINARIO (IMS)



1. Organiza aspekto

Post la 1-a kaj la 2-a IMS en Pollando (aprilo 1983 kaj 1985) kaj la 3-a IMS en Germana DR (decembro 1985), la 4-a IMS okazis en Hungario (28 sept. – 4 okt. 1986) en la luksa Feridomo de Fervojistoj en Gárdony.

La seminarion partoprenis 60 personoj el 9 landoj: BG, ĈS, FRG, GDR, H, I, NZ, PL, SU. Oficialaj reprezentantoj venis el BG, ĈS, GDR, I kaj PL.

Okaze de la malfermo, la seminarion salutis persone reprezentantoj de:
Sindikato de Pedagogoj: sekciestro s-ino Salamon Edit,
Kleriga Sekcio de la Konsilio kaj Pedagogia Instituto de la Departemento Fejér: D-ro Németh János,
Hungara Esperanto-Asocio: sekretario s-ro Princz Oszkár,
Esperanto-fako de la Universitato ELTE:
la gvidanto D-ro Szerdahelyi István,
ILEI: prezidanto D-ro Szerdahelyi István,
kaj oficialaj reprezentantoj el GDR, I, PL, H.

Letere sendis bondezirojn:
Landa Pedagogia Instituto: ĉefdirektoro D-ro Szabolcsi Miklós,
Mondpaca Esperanto-Movado: prezidanto D-ro Pethes Imre,
Internacia Esperanto-Instituto: s-ino Horst-Kolińska, M.vd.d.

La Sindikato de Pedagogoj kaj HEA ankaŭ finance kontribuis al la seminario.

S-ino Salamon Edit diris riĉenhavan paroladon pri la rilatoj inter homo kaj teĥnikaĵo en nia epoko. Ŝia parolado aperos esperantigita en IPR.

Nefakaj programeroj estis:
la 1-an de oktobro, tuttaga ekskurso al Budapeŝto kun (antaŭtagmeze) vizito al la Nacia Biblioteko Széchenyi, kaj (vespere) Liszt-koncerto de pianisto Mocsári G., gajninto de internacia konkurso;
la 2-an de oktobro, (posttagmeze) duontaga ekskurso al la urbo Székesfehérvár, kun urborigardado + vizito al la Romia Gorsium en Tác, kaj (vespere) solena manĝo en restoracio sub organizado kaj en la societo de lokaj esperantistoj;
interkona kaj adiaŭa vesperoj

Dum la 4-a IMS funkciis ankaŭ libroservo.

Organizantoj kaj prizorgantoj de la seminario estis: instruistinoj Barcsay Zsuzsa, Baross-Kóródy Zsófia, Kovács Márta, Patay Irén.

2. Faka programo

La kadrotemo de la 4-a IMS estis: *Instruhelpiloj en la fremdlingvo-instruado, kun aparta konsidero al Esperanto.*

La ekspliko de tiu ĉi temo estis ege varia. Kun prelegoj kaj prezentoj elpaŝis 21 instruistoj/kursgvidantoj, kelkaj el ili eĉ dufoje, t.e. entute 28 kontribuaĵoj konsistigis la fakan programon. Jen la prelegoj en laŭtema grupigo:

Enkonduka prelego pri la kadrotemo
Dr. Szerdahelyi I.: "Kion signifas «demonstrado» en la didaktiko?"

Pri diversaj informaĵ-portantoj
Barcsay Zsuzsa: "Instruhoro kun aŭd-vida kasedo"
Velősy Klára: "Enciklopediaj tabuloj" kaj "Kolor-ilustrita por-infana lernolibro-projekto"
Behrmann H.: "Bild- kaj sonmaterialo de la «Lingvo-orientiga instruado» por 3-4-aj klasanoj"
Sebián-Szőcs Ágnes: "Memfaritaj pupoj por 3-4-aj klasanoj"
Jodasová Pavla: "Paroligaj bildoj"
Soós Károly: "Poŝmagnetofono en la lingvolernado"
Bognár Ágnes: "Gazet-eltondaĵoj"
Kiss Orsika: "Memfaritaj demonstriloj flanelaj kaj paperaj".

Pri komputilo
Koutny Ilona: "Rolo de komputilo en la instruado de fremdlingvoj"

Didaktikaj ludoj, humuro
Janeva Rumjana: "Didaktiko de la ludo; gramatikaj ludoj"
Hompasz-Horváth Judit: "Kolektaĵo de lingvaj ludoj de Szopori-Szabó Piroska"
Faragó Katalin: "Serioze kaj gaje – helpe de ludoj"
MacGill Stefan: "Instrui humure. Skeĉoj"

Evoluigo de parolkapablo per kreo de situacioj
Jodasová Pavla: "Metodoj de paroligo de lernantoj"

Koutny Ilona: "Dumkongresaj konversaciaj kursoj per lingvistikaj rimedoj"
Szanser Irena: "Evoluigo de parolkapablo. Teorio kaj praktiko"

Konsciigo pri la lingva strukturo

Szanser Irena: "Mediatoroj en la instruado de fremdaj lingvoj – funkcio kaj uzo" (kun ekzemploj)
Szedmák Károly: "Gramatikaj tabeloj de Esperanto, kompilendaj dum la kurso, fare de la gelernantoj"
Gyenes Sándor: "Granda kaj varia kreado de kompleksa frazo el simplaj elementoj"

Pedagogiaj skoloj

Farkas-Tatár Éva: "Demonstrilaro de la Cseh-metodo"
Oleszek Halina: "Informoj pri Freinet-konferenco 1987"

Plialtigo de la ĝenerala klereco kaj estetika edukado en instruhoroj de fremdaj lingvoj

D-ro Dahlenburg T.: "Pedagogia valoro de literatur-lingva komparado" (diversaj tradukoj el Lermontov: Parus)
D-ro Dahlenburg T.: "Kiel plialtigi samtempe la lingvajn spertojn de talentuloj kaj la lernemon de maldiligentuloj?" (per ĝeneralkleriga kompletiga materialo)

Post la prelegoj kaj dum la paŭzoj okazis diskutoj kaj spert-interŝanĝoj. La memfaritaj demonstriloj brile pruvas la inventemon kaj sindediĉon de engaĝitaj kursgvidantoj-pedagogoj (Velősy, Sebián, Kiss, Szedmák, Farkas k.a.).

El inter la prelegintoj de la 4-a IMS elstaras: Dahlenburg, Koutny, Jodasová, MacGill, Janeva.

La fakan programon gvidis D-ro Szerdahelyi kaj Barcsay Zs.

3. Resumo de opinioj. Konkludoj de la seminario. Rekomendoj al la 5-a kaj venontaj IMS-oj

1. Pri la organizado, seminariejo kaj servoj ĉiuj seminarianoj estis kontentaj.
2. Ĉiu preleganto obeis al la kadrotemo. Ene de tio la temoj kaj aspektoj (kaj la nivelo) de la prelegoj/ kontribuaĵoj estis tre variaj.
3. Unueca opinio elformiĝis pri tio, ke:
   unuflanke estus necese havi multe pli da specoj da demonstriloj, ol estas aĉeteblaj/akireblaj en la merkato;
   aliflanke ĉiuj helpiloj fariĝas efikaj nur sub aplikado de instruistoj kun alta faka kvalifiko, kun respektinda homa karaktero, laborantaj kun pedagogia destino.
   La informaĵ-portantoj kaj aparatoj estas nur helpiloj, kiuj neniam povas anstataŭi la homon.
4. Jenaj interesoj manifestiĝis koncerne la venontan IMS:
4.1. Temo de la 5-a IMS estu: "La instruhoro".
4.2. Teoria metodika prelego kaj praktika leciono kompletigu unu la alian pri la sama temo.
4.3. Ni dediĉu pli da atento je instruado al progresantoj en la lingvo.
4.4. La prelegontoj/prezentontoj ĝustatempe sendu al la organizanto klaran titolon de la kontribuaĵo, kun kelkfraza klarigo pri la enhavo.
4.5. Ni lasu pli da tempo por diskutoj dum la seminario.
4.6. Utiligante la spertojn en instruado de aliaj fremdaj lingvoj, ni okupiĝu pri komuna metodologio de fremdlingvo-instruado.
4.7. En pli longa perspektivo ni prilaboru pedagogian terminologion, kaj dum la sinsekvaj IMS-oj ni raportu pri la farita laboro, resp. ni pridiskutu la problemojn.
4.8. Simile en pli longdaŭra tempo ni analizu/recenzu nove aperintajn lernolibrojn, kaj ni publikigu la kritikojn.
4.9. Por garantii la kontinuecon de la laboro, estas dezirinde, ke parto de la seminarianoj estu konstantaj partoprenantoj, samtempe reprezentantoj de sia LA, resp. ILEI-sekcio.
5. La 5-an IMS-on aranĝos Bulgara Esperantista Asocio en aprilo 1987 en Pisanica.

El la vivo de niaj Sekcioj

● Tre aktive kaj tre serioze eklaboris la Svisa Sekcio. Modela estas ilia statuto. La interesiĝantoj sin turnu al Svisa ILEI-Sekcio, K.C.E., Postiers 27, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

■ Elstaras la lernej-politika aktiveco kaj la preparado de instruistoj de Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj (*Österreichische Esperantolehrer Vereinigung*), Faksekcio de AEF kaj Landa Sekcio de ILEI, en strikta rilato kun la oficialaj klerigaj instancoj, kun la apogo de la Landa Pedagogia Instituto kaj intima kunlaboro kun la Internacia Kultura Servo (Zagrebo). Modela estas ilia "Projekto" (*Projekt zur pädagogischen Tatsachenforschung Esperanto*), oficiale akceptita. Pri ilia laboro detale ni revenos en la sekva n-ro de IPR. Interesiĝantoj sin turnu al Karl Hirmann, Ehrlergasse 14, A-8010 Graz.

▼ Eble la plej abrupta altiĝo de membraro okazis ĉe la Hungara ILEI-Sekcio: 1985 - 10, 1986 - 47, 1987 - 60 membroj! Estas elektita definitiva estraro de la sekcio (prezidanto, vicprezidanto, sekretario-kasisto), kaj fondiĝis ILEI-klubo, kiu organizas diversgradajn kursojn, kunvenas ĉiun duan ĵaŭdon de la monato por pridiskuti lingvajn kaj metodikajn problemojn.

▲ Alvenis en niaj manoj du ekzemplodone informriĉaj sciigiloj de ILEI:
– la *Novaĵletero* de la Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto;
– la kvaronjara *Bulteno* de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto.

Lavangon da informoj agrable interrompas ambaŭĵurnale poemoj, spritaj vortoj, interesaj anoncoj. Jen la plej ekscita el Nederlando:

Novkulturita tulipo nomiĝas *Esperanto*. La folietoj de la floro estas verdaj kun ruĝa rando; la folioj estas verdaj kun blanka rando. Mendeblaj ĉe: Walter Blom, Hyacintenlaan 2, NL-2182 DE Hillegom. (Prezo: 10 guldenoj por kvin bulboj.)

Tiel floru ankaŭ aliaj ILEI-periodaĵoj!

◆ **Okazontaj eventoj**

U.F.E. sciigas, ke okazos la 2-a Pedagogia Seminario de UFE-GEE je Pasko 1987 en Lyon (Francio). — Temo: "Instruado de Esperanto al infanoj de elementa lernejo, mezlernejanoj, liceanoj kaj studentoj. Prezento de la eksperimento de Villefranche." — Ĉiu partopreninto ricevos atestilon pri partopreno. — Aliĝiloj estas haveblaj ĉe: U.F.E., Pedagogia Seminario, 4bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris; aŭ ĉe CERL, Pedagogia Seminario, 7 rue Major-Martin, F-69001 Lyon.

Samtempe, la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) kaj la Grupo de Esperantistaj Edukistoj (GEE) intencas organizi Ekspozicion de *Esperanta instru-materialo* (libroj, kasedoj, ktp) en la sidejoj de la Centro Regiona pri Pedagogia Dokumentado (CRDP). — Aŭtoroj ĉiulandaj kaj eldonistoj povos sendi *reklam-ekzempleron* al: Esperanto, E. Ludwig, 26 route de la Schlucht, Stosswihr, F-68140 Munster.

Inter la 21-a kaj la 25-a de majo okazos la 29-a Kultura Semajno-Fino, aranĝota fare de Saarlanda Esperanto-Ligo. — Adreso: Schulstrasse 30, D-6601 Saarbrücken-Scheidt. — La kadrotemo estos: "La nuntempa stato de interlingvistiko kaj esperantologio". — Preleganto estos Profesoro Szerdahelyi István. — Paralele okazos kursoj por komencantoj kaj progresantoj. — Petu aliĝilon de SEL.

Librobreto

INFANLIBROJ

Ĉinaj eldonaĵoj

El Ĉinio venas nova svarmo da Esperanto-libroj, jen historiaj, jen belliteraturaj, jen propagandaj — sed ĉiam belaspektaj, nemultekostaj, verkitaj en bona Eo. Tiujn tri virtojn ankaŭ iliaj infanlibroj ne malhavas:

Ĉevalido Transiras Riveron; la Fiera Multkolora Kateto; Lupo Invitas Urson. — Jam la titoloj allogas. Eĉ pli la bildoj, multkoloraj kiel fiera kateto, kaj la prezoj, variantaj ĉirkaŭ 1 $. Antaŭ ol donaci al infanoj, konsilindas tamen trafoliumi la libretojn, ĉar la motivo de kruelo (kiu same ĉeestas ĉe Perrault aŭ Grimm) kelkfoje tro aperte manifestiĝas: la Ruza Griza Lupego sinsekve estas ŝtonumata, pendumata kaj mortbatata... Ne hezitu tamen skribi por prospekto aŭ rekte por mendo al: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, Guoji Shudian, Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Heliaz Per-Jakez: **Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo** kaj **Tri Rakontoj el la Fiero-Ĉevalo**. — El la franca tradukis Frédéric LE MAGADURE. — Eld. GEE, Franca Sekcio de ILEI. — 56 paĝoj.

"... plenkreskulo ofte staras kun trista koro, poste li malfermas libron kaj ekridetas... Se tio dependus de mi, ĉiujn infanlibrojn ilustrus infanoj", skribis kolego en recenzo. Rigardante ĉi-kajereton, ni povas nur konstati, dank'al "junaj anoj de la Esperanto-grupo Vekiĝu", kiel scigas la titolpaĝo. Pro la agrabla kristnaskovespera horo, kiun mi pasigis kun la libreto, dankendas ankoraŭ la tradukinto, kiu provizis ĝin ankaŭ per informoriĉa, konciza enkonduko. — «Kiel Bretono...» estas imitinda ekzemplo kaj bona pruvo de tio, kiel Eo kapablas peri valorojn de malgrandaj, minoritataj kulturoj, kiuj ofte ne povas trovi vojon al alilingva legantaro.

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Szerdahelyi István, Universitato ELTE/BTK, H-1364 Budapest, Pf. 107
Vicprezidanto : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
Sekretario : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
Vicsekretario : Bâcev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
Kasisto : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986) Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (N, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo : Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : ĉe E.T.A., Kinburn House, Egham Hill, Egham, Surrey TW 20 0BD
Ĉinujo : Zhang Danchen Huazhong, Normala Universitato, Hubei, Wuhan
Danujo : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim (provizore)
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Lilienthalstr. 3, D-6900 Augsburg
Grekujo : K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, Strato Pyrou 28, GR-11635 Ateno
Hispanujo : Manuel López Hernández Mata, 21, 2° izq. 41.002 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Josef Murĵan, P.K. 1289, IL-61012 Tel Aviv
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : c/o Yukika Isobe, J.E.I., Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : John C. Birmingham Jr, 5201 Patterson Ave, Richmond VA 23226, USA
Norvegujo : Rolf Anda, N-4343 Orre
Pollando : Irena Szanzer, Lewartowskiego 9 m. 17, PL-00 185 Warszawa
Portugalio : Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26, 2°., P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 Republica di San Marino
Sud-Afriko : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen
Sud-Koreujo : So Gil Su-Sodemun, P.K. 59, Seŭlo
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende

Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESCO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016

FIMEM : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

ICEM : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

EC : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

EEC : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

IKS : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

KSM : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

Kontribuaĵoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)